

Edward Lear,

## La Strig' kaj la Kato

*tradukita de Pejno Simono*

I

La Strig' kaj la Kato en verda boato  
 ekvelis kun kargo abunda,  
 mielo por manĝi kaj mono por ŝanĝi  
 en Angla bileto kvinpunda.  
 Sub nokta stelaro kun eta gitaro  
 ekkantis la Strig' pro inklin',  
 "Ho bela vi Kato! Ho mia amato!  
 Ho Kato vi ravas ja min,  
 ja min,  
 ja min!  
 Ho Kato vi ravas ja min!"

II

La Kat' aklamanta "Vi bird' eleganta!  
 Vi kantas ĉarmege ulule!  
 Ho ni geedziĝu! Hezit' ne estiĝu!  
 Sed havas da ringoj ni nule!"  
 Tra jaro plus tago ekestis vojaĝo  
 al land', kie kreskas bonguj',  
 kaj jen en arbaro renkontis la paro  
 Porkidon kun ring' en naztru',  
 naztru',  
 naztru'.  
 Porkidon kun ring' en naztru'.

...

## III

“Jen unu ŝilingo por via nazringo!  
Ĉu bone?” La Porko kvitigis.  
La tagon pli poste la paron senkoste  
Kok’ Hinda sur monto ĵurligis.  
De ment’ la foliojn kaj cent cidoniojn  
ili manĝis per runca kuler’,  
festenis lunlume kaj dancis brakume  
sur plaĝ’ en la nokta aer’,  
aer’,  
aer’.  
Sur plaĝ’ en la nokta aer’.

*Traduko de la Angla poemo “The Owl and the Pussy-cat” de Edward Lear en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

*Arg-976-1967 (2014-03-13 21:45:19)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troveblas en la retejo <http://www.bompa.org/>.*